

Kontraŭdiroj en nia penso

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 529, 1981.11.05 & 07

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉiuj homoj estas tre profunde influitaj de la socio, en kiu ili infanis kaj junaĝis. Tio estas vero ĝenerale akceptita. Sed la konsekvenco estas, ke ni vidas la aliajn sociojn tra misformiga prismo, kiu tendencas avantaĝi la aspektojn kiuj kongruas kun niaj senkonsciaj simpatioj kaj malavantaĝi la aliajn.

A.- La revuo L'ESSOR, en sia oktobra numero, publikigis, koncerne la manieron vidi alies landon, tre interesan artikolon titolitan en la franca "A leur écoute", kion ni tradukas per "Ni aŭskultu ilin."

C1.- Temas pri du junuloj el Zairo, Nzimba kaj Nzuzi, kiuj donis siajn impresojn pri sia unua kontakto kun la vivo en Svislando. La redaktoro Jean-Frédéric Rosselet el Lausanne registris iliajn dirojn kaj tute simple ilin transskribis por la koncerna artikolo, el kiu ni abunde citos. Kio interesas nin en la rakontoj de tiuj deknaŭjaraĝaj ĝemeloj el Zairo, tio ne estas iliaj vidpunktoj pri Svislando, sed antaŭ ĉio la kontraŭdiroj en ilia penso. Kunvivas en ilia mondkoncepto admiroj kaj bedaŭroj, ŝatoj kaj malŝatoj malfacile akordigeblaj. Pri tio Nzimba kaj Nzuzi ne konscias.

A.- Ni ne citos traduke ilin, por juĝi tiujn junajn afrikanojn, sed por komprenigi, ke ankaŭ ĉe ni mem, en niaj juĝoj pri la ceteraj landoj, ni tre ofte neracie kondutas, restante subjektive ligitaj al antaŭjuĝoj pensniiĝaj.

Cl.- En sia rakonto Nzimba kaj Nzuzi, kiuj alvenis en Svislando meze de aŭgusto, sin tiel prezentas:

A.- "Ni forlasis nian landon Zairo sekve al nia partopreno en studenta manifestacio protestinta kontraŭ la malaltaj salajroj en Kinŝasa, en la monato marto 1980. Dum kaj post tiu ĉi manifestacio multaj studentoj estis arestitaj, kelkaj eĉ mortpafitaj. Sciante, ke ni estos malliberigitaj, ni rifuĝis en nian vilaĝon, for de la ĉefurbo, dum pretiĝis niaj pasportoj kaj niaj biletoj por forflugo. En la flughaveno nian forveturon faciligis sampensa doganisto... Ni elektis flugon al Svislando, ĉar unu el niaj fratinoj tie jam laboris."

C1.- Sekvas kelkaj konsideroj pri la vivo en Svislando:

A.- "En Svislando estas agrable, estas kviete. Ne ekzistas perfortemo, ne laboradas salajrataj mortigistoj. Nokte ni povas promeni en soleco senriske. Sed ekzistas tro da regularoj, tro da leĝoj. Ĉiuj tiuj administraj klopodoj, antaŭ kiuj ni troviĝas, kaŭzas al ni kiap dolorojn."

Cl.- "Ĝenerale la svisoj ne kapablas amuziĝi. Ekde la deka vespere oni ne rajtas plu laŭte muziki. Ĉe ni en Afriko tre ofte personoj diskutadas, aŭskultas muzikon, dancas, trinkas, ĝis la mateniĝo. Tiam estas etoso, vivĝojo, gajo."

A.- "la zaira popolo vivas elturniĝeme, ĉar la salajroj tro malaltas. Ĉiu komercetas. Oni posedas kvazaŭ propran butiketon surstrate, kie oni vendas ion ajn. En Svislando, malfeliĉe, tia afero estas neebila; ekzistas tro da leĝoj."

C1.- "Tie ĉi en Svislando ekzistas tro da libereco. Oni povas manifesti kontraŭ la politiko de la registaro, se oni uzas leĝajn rimedojn. En Zairo, tio neblas. Se Mobutu diras jes, la popolo estas devigata jesi, La voĉdonoj estas manipolataj."

A.- Aŭdante tiujn kelkajn konstatojn de Nzimba kaj Nzuzi, vi tuj konstatis, ke ili samtempe esprimas kontentecon kaj bedaŭron. Ili ne komprenas, ke perforto regas, kiam malekzistas la esprim-libereco kaj kiam mankas ĝenerale respektata leĝsistemo. Oni ne povas samtempe celadi al inter si kontraŭaj liberecoj: aŭ regas la libereco de la individua elturniĝemo, kiel ŝajnas esti en Zairo laŭ Nzimba kaj Nzuzi, kaj tiam oni timu la mortigistojn kaj la nerespekton de la demokrataj vivreguloj, aŭ kontraŭe oni kultivas demokratan ordon, kiu necese kaŭzas limigojn en la individua libereco. La nokton oni tiam devas respekti la dormon de la nefestemaj : la komercado estas submetata al preciza juro. Tion ĉi verŝajne baldaŭ malkovros Nzimba kaj Nzuzi, kiam ili pli profunde analizos per komparoj la vivon en inter si tiom malsimilaj landoj kiel Svislando kaj Zairo.

C1.- Multaj junaj eŭropanoj sopiras al la afrika libero laŭtmuziki nokte, neglekti la leĝojn kaj regularojn, kiel reciproke afrikanoj sopiras al pli kompleksa socia ordo.

A.- Ni revenu al la komparoj de niaj junaj Zairanoj por vidi, kiel ili konceptas la interseksajn rilatojn:

C1.- "En Afriko la egaleco inter la viroj kaj la virinoj ne ekzistas. En Svislando ĝi ekzistas, kaj ni ne trovas tion normala. Se la afrika virino fariĝus libera kiel tie ĉi, regus malordo. Ni ne komprenas, kial en Eŭropo okazas tiom da divorcoj. En Zairo oni rajtas bati sian edzinon sen zorgo pri divorco. Krome la edzino estas farita por resti hejme. Ne estas normale, ke virino rajtas porti pantalonon aŭ sportkuloton. Tio estas konkurenco kontraŭ la viroj kaj tio estas ŝoka por la junaj fraŭloj. En Zairo la soldatoj rajtas distranĉi la pantalonon de la virinoj por ilin senpantalonigi."

A.- Jen citaĵo kiu montras, kiel la veneno de perfortemo inside infektas nin. Tiuj zairanoj rifuĝis for, ĉar sekve al studenta manifestacio ili estis malliberigeblaj. Sed facilanime ili akceptas perfortemon al la virinoj, dum por si mem ili plendas pri ĝi. Tiaj kontraŭecoj vivas en ĉiuj niaj mensoj kaj malhelpas nin objektivig rigardi la realecon. Ili subjektivigas ĝin, submetas ĝin al antaŭjuĝoj, kiuj miopigas nian penson.

C1.- Antaŭ ne tre longe ankaŭ en Eŭropo la pantolono simbolis la virecon kaj la skiemaj virinoj devis robe praktiki la novan sporton. Sed kiam ili komencis alvali pantalone, ili tamen ne timis, ke soldatoj intervenos por senpantolonigi ilin kun la beno de la tradiciemularo. Regis jura ordo, kie ofenditoj kontraŭ aŭ al la kutimoj povis plendi. Neperfortemo povas ekzisti, nur kiam tribunalaj juĝoj anstataŭas la arbitrecon de la memjuĝoj aŭ de tiuj de la polico kaj soldatoj. Eble tion ĉi malkovros Nzimba kaj Nzuzi. dum sia metilernado en Svislando.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond provis montri kiel kontraŭdira povas esti nia penso. Ĝis reaŭdo !